FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

STIFTUNG BSW

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | **Numero 3** | **Julio/Septembro 2005**



Dieses Foto mit dem IC in der Kurve entstand genau an der Stelle, wo eine Pferdebahn im März 1854 mit dem Personenzug aus Essen zusammenstieß. (Siehe hierzu Seite 6)

Nekrologo Willi Brandenburg
* 29.03.1922 † 03.08.2005

Ni funebras pri la morto de Willi Brandenburg. Li foriris por ĉiam.

Willi Brandenburg apartenis al tiu generacio, kiu perdis sian junecon en la dua mondmilito. Signita de la milito, li hejmenvenis. Pro siaj travivaĵoj dum la milito estiĝis al li la dezirion, fari ion por la paco. Li estis konvinkinta, per Esperanto iom kontribui al tiu celo. Li eklernis Esperanton jam 1947 kaj tuj transprenis respondecojn kaj multajn taskojn por disvastigi la internacian lingvon. Li fondis 1948 la postmilitan Esperanto-grupon Münster de GEA kaj estiĝis ties presidanto ĝis 1960. La internacia lingvo Esperanto ankaŭ tre karakterigis la komunan vivon de la geedzparo Brandenburg. Ambaŭ tre aktivis en Esperantujo. Tri infanojn ili ricevis kaj decidis eduki ilin dulingve, apud germane Esperanton. 1951 Willi Brandenburg komencis laboro ĉe la fervojo kiel inĝeniero. Lia unua oficiala tasko en GEFA komenciĝis je la unua de aprilo 1955. Li transprenis la postenon de „subsekciestro", (nia hodiaŭa distriktkomisiito), en la direkcia distrikto Münster, kio li restis ĝis 1968. Li gvidis multajn Esperanto-kursojn en la Fervoja-Faklernejo kaj aliloke. Ek de 1956 aktivis Willi kaj Margret en la organisado, gvidado aŭ kiel helpantoj en infankongresoj kadre de UEA-kongresoj en Kopenhagen, Marseille, Mainz kaj Brüssel. Multajn IFEF-kongresojn, jarkunvenojn, naciajn kaj internaciajn renkontojn ili komune vizitis, organisis aŭ helpis tie.1968 – 1972 estis Willi presidanto de GEFA.

Nombri kaj mencii ĉiujn taskojn kaj oficojn de Willi Brandenburg ne estas eble en kadro de nekrologo. Multajn prelegojn, artikolojn kaj raportojn li verkis. Ses jarojn li oficis kiel ekzamenkomisiito en la iama GEFA ekzamenkomisiono kaj estris la komisionon por fakprelegoj (IFEF).

En la publika vivo ambaŭ, Willi kaj Margret, oficis kiel laikaj juĝistoj kaj ili fondis 1980 la helpasocieton „Bona Espero".

Nun Willi foriris por ĉiam. Lia loko estas malplena. Ni kondolencas al edzino Margret, al infanoj kaj al familio. Ni funebras kun ili.

Willi vivis plenan vivon kaj tio iom konsolas nin. Li restos por ĉiam en nia memoro.

Rolf Terjung, prezidanto de GEFA



Ĉu vi forgesis aliĝi al nia jarkunveno en Rantum/Sylt (14. – 16. oktobro)?

Estas via la lasta ŝanco ankoraŭ ricevi lokon en nia kongresejo „Alt Rantum". Aliĝilo troviĝas en „Fervoja Esperantisto", Nr. 1/2005. Se vi ne plu trovas ĝin, mi povas sendi al vi ekzempleron de tiu aliĝilo.
Ĉiu partoprenanto ricevos kiel salutdonacon tason da kafo kaj tipan „Friesenkuchen". (BBa dum laborkunsido.)
La insula rondveturo daŭros $3^1/_2$ horojn kun duonhora paŭzo en List kaj kvaronhora paŭzo en Hornum, do, sen oficiala kafopaŭzo.
Viajn hotelkostojn pagu rekte en la hotelo. Ili inkluzivas maten- kaj vespermanĝon.
Detalan programon vi ricevos post via alveno.

47-a Internacia Fervojista Esperanto Skisemajno BANSKO, en montaro PIRIN, Bulgario

De la 5-a ĝis la 11-a de februaro 2006 okazos en Bansko, Bulgario, en la montaro Pirin, la 47-a „Internacia Fervojista Esperanto skisemajno", kiu vere ne estas „skisemajno" sed „vintrosemajno", ĉar multaj partoprenantoj ne skias, sed „nur" promenante ĝuas la belan vintropejzaĝon.
Aliĝiloj kaj informoj: Rena Georgieva, 4000 Plovdiv, Centralna poŝta, p.k. 35, Bulgario.
Tel. kaj fakso: +359 32 64 95 73, Retadreso: renag@mail.bg

Memortagoj Joachim Gießner

La **„Interkultura Centro Herzberg (ICH)**, (Germana Esperanto-Centro kaj Kulturcentro de UEA) okazigos de la **9. – 14. Oktober 2005**
„Memortagojn pri la fama IFEF-prezidinto **Joachim Gießner** el Herzberg. La tuton gvidos Magdalina Feificova, Slovakio. Temo: Studado de diversspecaj materialoj el la Joachim Gießner arkivo en ICH.
Adreso: Germana Esperanto-Centro,
Grubenstraße 6
37412 Herzberg am Harz
Tel. 05521/5983,
reto: esperanto-zentrum@web.de
Poste kunvenurebleco al la jarkunveno en „Alt Rantum", Sylt.

Por kongrespartoprenontoj 2006 en Ŝanhajo:

Flugo per flugkompanio LTU de Düsseldorf al Ŝanhajo kaj reen de Beijing, (kie okazos postkongreso), al Düsseldorf, kostas laŭ informo de LTU nuntempe 714,00 €, se vi sufuĉe frue aĉetas bileton (Frühbuchung).

Ekskursoj en la fervojan historion

Horindiko

Je la 15-a de majo 1891 la „Reĝa Fervoja Direkcio Essen“ sciigis, ke ek de la 1-a de junio de tiu ĉi jaro ne plu validas la „Berlina Tempo“, sed kompetenta estas la „Mezeŭropa Tempo“. Tiu estas la loka tempo de la 15-a longitudo oriente de Greenwich. Tiun tempon vi ricevas per aldono de ses minutoj al la Berlina Tempo. En la „Prusia Ŝtatfervojo“ kaj en tiuj germanaj fervojoj, kiuj ankoraŭ uzis la lokan tempon, oni enkondukis la „Mezeŭropan Tempon“ ĝenerale je la 1-a de aprilo 1893.

Je la 1-a de majo 1927 estis enkondukata la 24-horaj-nombrado por diferenci inter la antaŭ- kaj posttagmeza tempo.

Trovis en „Rheinische Eisenbahn“: de F. Stöters: Rolf Terjung



Ekvetursignalo permana en la pasaĝertrafiko

Ek de la 1-a de januaro 1910 oni elprovis en la pasaĝertrafiko doni la permanan ekvetursignalon fare de kajoĉefo al la lokomotivestro dumtage per „ordonbastono (Befehlsstab)“ kaj dum la nokto per flave lumanta manlaterno. Tiu „elprovo“ estis enkondukata en la pasaĝertrafiko de la „Bergisch-Märkischen“ fervojo inter Duisburg kaj Dortmund kaj en la „Köln-Mindener“ inter Duisburg kaj Hamm (Westf.). La voko „ekveturu“ ne estis permesita dum tiu elprovtempo. La fajfsignalilo averta ankoraŭ ne ekzistis.

Ĉe la enkonduko de tiu nova sistemo de ekveturordono montriĝis kelkaj komplikaĵoj: Pro manko de aŭdebla signalo, la pasaĝeroj estis surprizata dum entrajniĝo kiam la trajno subite ekveturas kaj tial multaj pasaĝeroj postrestis sur la kajo. En malhelaj stacidomaj haloj la ordonbastono ne bone estis videbla. Pro nebulo kaj kondensato de fumo kaj vaporo malfaciliĝis ofte la interkompreniĝo inter kajoĉefo kaj lokomotivestro. Dum kargado de vagonoj fare de poŝto kaj fervojo, interrompiĝis la laborfluo pro manko de la voko „ekveturu“,. Nur post ekzameno fare de ekspluat-inspektado pri okazintaj malfacilaĵoj, estis enkondukata la fajfsignalilo averta per buŝfajfilo.

Trovis en „Rheinische Eisenbahn“ de F. Stöters: Rolf Terjung

Auszeichnung von Franz Okelmann, Bayreuth

Von Christoph Höreth

Der BELO-Präsident für Bayern, Armin Grötzner aus Kronach, überreichte dem verdienten Esperanto-Pionier die Urkunde in Anwesenheit von Vertretern der Esperanto-Gruppen aus Nürnberg, Erlangen, Bamberg, Forchheim, Hof und Kronach.
Die Auszeichnung erhielt Franz Okelmann für seine großen Verdienste um die Verbreitung der internationalen Verständigungssprache Esperanto und nicht zuletzt für die Herausgabe von Wörterbüchern in Esperanto-Deutsch und Deutsch-Esperanto, die in den Jahren 1989 bis 1996 erschienen sind.
Wie anerkannt seine Wörterbücher in Esperanto-Kreisen sind, beweisen die Glückwunschschreiben zur Ehrung. So gratulieren der Präsident des Esperanto-Weltbundes, Renato Corsetti aus Italien, der Deutsche Esperanto-Bund e.V. mit Sitz in Freiburg, Esperanto-Gruppen aus Österreich, der Schweiz und Rumänien.
Der 1913 in Österreich geborene Franz Okelmann heiratete während des Zweiten Weltkrieges eine Bayreutherin. Im Jahre 1949 gründete er hier einen Dachdeckerbetrieb, den er 1978 im Alter von 65 Jahren seinem Sohn übergab.
Als Rentner erinnerte sich Okelmann an seine Schulzeit in der einklassigen Dorfschule in Hakenbuch bei Braunau am Inn. Der Lehrer war ein begeisterter Esperanto-Anhänger. Einige Buben, unter ihnen Franz Okelmann, motivierte er, diese Welthilfssprache oder "Brückensprache" zwischen den Völkern, wie er sie nannte, zu erlernen. In Extrastunden unterrichtete er sie.
Als Ruheständler nahm Okelmann 1981 erstmals wieder an einem Esperanto-Kurs an der Volkshochschule Bayreuth teil.
Mit Begeisterung besuchte er auch die nächsten Kurse und traf sich in dieser Zeit zusätzlich jede Woche mit anderen Teilnehmern zum Gedankenaustausch und zur Sprachenverbesserung. Unzufrieden war er mit den vorhandenen Nachschlagewerken und Wörterbüchern. Er verfasste selbst welche, die ab 1989 erschienen sind und großen Anklang fanden.
Der Esperanto-Liga Bayern gehören derzeit 250 Mitglieder an. In den Gruppen gibt es häufig Zusammenkünfte, wie man sich auch bei Kongressen trifft. Und nicht selten hört man dabei die Frage: "Hast du den Okelmann dabei?" Gemeint ist das Okelmannsche Wörterbuch.

* * *

Okelmann ist GEFA-Mitglied. Wir gratulieren ihm herzlich zu dieser Auszeichnung.

* * *

Unsere Stuttgarter Gruppe hat einige Exemplare der Wörterbücher aus dem Bestand von Franz Okelmann übernommen.
Diese sind zu beziehen über Alois Eder, Grabenstraße 63A, 71116 Gärtringen
Telefon 07034-22859, Fax 07034-253863, E-Mail: alois.eder@esperanto.de

Ni, Friedrich Wilhelm, de dia favoro, reĝo de Prusio ktp. ktp.

Tiel komencas la diplomo pri permeso konstrui ĉevalfervojon inter la karbminejo „Sellerbeck“ (ĉe Mülheim an der Ruhr) kaj haveno Mülheim an der Ruhr, je la 13-a de marto 1854.

Sed tiu ĉevalfervojo havis ek de la komenco gravan mankon. Ĝi nome kruciĝis la fervojliniojn inter Essen kaj Mülheim an der Ruhr ĵus en tiu loko, kiun montras la bildo kun la trajno sur nia nova Esperanto-faltfolio. Do, akcidentoj estis jam antaŭprogramitaj, kiel sekvonta gazetraporto de la 23-a de septembro 1864 montras.

„Hodiaŭ posttagmeze, kiam veturigisto de la karbminejo Sellerbeck intencis veturigi sian karbtrajnon sur la ĉevalfervojo al la havena magazeno, li rimarkis, kiam li rerigardis, ke dek ŝarĝitaj karbvagonoj de la minejo malsuprenrolis. Ekkonante la danĝeron, li tui maljungis sian ĉevalon kaj gvidis ĝin apuden de la reloj. Ĝus kiam tiu okazis, la vagonoj trarompis en plena rapideco la fervojajn barierojn kaj eltrakiĝis sur la trakkruciĝo. En la sama momento alrapidegis la 2-hora-trajno de Essen. Kvankam la bariergardisto, svingante flagon, renkonte kuris al la trajno, la lokomotivestro ne sukcesis haltigi la trajnon sufiĉe frue, ĉar la fervojlinio tie havis grandan niveldiferencon kaj ĝirejon , tiel ke la lokomotivestro tro malfrue rimarkis la danĝeron montranta avertsignalon. Kvankam la lokomotivestro tuj komencis pri la danĝerbremsado, la trajno ne sufiĉe frue haltis kaj kunŝiris la karbvagonojn pli ol cent metrojn. Ses vagonoj tute detruiĝis. Dum la kunpuŝo la pasaĝeroj saltis el la fervojkopeoj sen vundiĝi. Post kiam la trajno estis haltigata, oni forprenis la unuopaj partoj de la detruitaj vagonoj de sur la reloj kaj de sub la trajno. Tiam la trajno sin denove moviĝis je granda ĝojo de la tre konsternitaj kaj timemaj pasaĝeroj.“

La sekurigo de la fervoja trafiko rilate al tiu ĉevalfervojo okazis ĝenerale per tio, ke ambaŭ barieroj, tiu de la „Rheinischen Bahn“ kaj tiu de la „Bergisch-Merkischen Bahn“ ĉiam estis fermitaj kaj garditaj de bariergardistoj. Tio tre ĝenis la trafikon de la ĉevalfervojo. Pro tio la estraro de la karbminejo Sellerbeck plendis pri tiu afero ĉe la reĝa provinzregistraro. Tiu sendis por kvar semajnoj oficiston, kiu esploris la kaŭzon de la ĝenadoj. La resulto estis, ke la trajnestroj de la trajnoj, alproksimiĝante al la fervojkruciĝo, devis antaŭe signali, ke trajno proksimiĝas. La bariergardisto fermis la barieron tiam nur, kiam trajno venas. Kun progresanta tekniko en la trajnsekurigo, la fervojkompanioj enstalis poste en la proksimeco de tiuj lokoj blokstacion I por la Rheinische kaj blokstacion II por la Bergisch-Merkische Bahn.

Vi vidas, la teknika trajnsekurigo komencis jam en la deknaŭa jarcento.

(El „Rheinische Eisenbahn“ de F. Stöters, tradukita de R. Terjung)



Tagung der Hauptbeauftragten der Kulturgruppen in der Stiftung BSW im Juni 2005 in Bad Ems

Memoru! La membrokotizo por GEFA estas ek de komenca jaro por ĉiuj membroj egala, nome, 1,00 € monate, pagenda en unu jarsumo.

La mondo ridas

Voltaire, estante ankoraŭ knabo, estis foje demandata de ekleziulo: „Diru al mi, kion ne devas fari, por ke Dio nin pardonu?"
La juna Voltaire ne longe pripensis kaj respondis: „Ni devas peki, sinjoro pastro."

Ie en la provinco nova direktoro de l'juĝejo enoficiiĝis kaj tuj komencas reformi. Li mallaŭdas, ekzemple, ke en la buroj kuŝas tiom da malnovaj aktoj, kiuj neniam plu estos uzataj, kaj li turnis sin al siaj superuloj en la ĉefurbo, petante permeson por pereigo de tiu superflua papero. Post kelka tempo alvenas la respondon de la ministera direktoro: „Jes, mi tute konsentas, ke ĉio, kio ne plu estos necesa, estu forbruligata; - sed ne forgesu, antaŭe farigi kopiojn!"

„Ekzistas multaj metodoj por gajni monon, sed nur unu honesta."
„Kaj kiu ĝi estas?"
„Jen ja – mi jam antaŭe sciis, ke tiun vi ne konas."



Willi Brandenburg

* 29.03.1922 † 03.08.2005

Li devis militi kaj neniam forgesis tion.
Por la paco li volis mem ion fari.
Li lernis kaj disvastigis Eperanton.
"Neniam plu militon" estis lia konvinko.
Li transprenis respondecon kaj batalis,
tiom longe kiel li povis, persiste kaj foje obstine.
Lia familio estis sia centro de gravito.
Li restos inter ni.

Funebra diservo okazis la 8-an de aŭgusto en la St. Anna-kapelo en Westbevern-Vadrup, la entombigo pli poste en privata rondo.

Ni elkore kondolencas al lia familio, unuarange al lia edzino Margret
Omaĝo sur paĝo 2

Redaktfino por FE 4/2005 estos la 15.11.2005
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schritfleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel/Fax (06 61) 7 76 27, E-Mail: f-lautenbach@fulda-online.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361